

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni dediĉos por la lasta fojo nian atenton al la libro *Les Patries [La Patrioj]* verkita de **Jean Diedisheim** kaj eldonita de **La Baconnière** en **Neuchâtel**, Svislando.

A.- Tiu libro estas interesa komplemento al la verko *Interpopola konduto* de **Edmond Privat**.

Cl.- En sia konkludo Jean Diedisheim rimarkigas, ke trajto estas komuna al ĉiuj naciaj ŝtatoj :

A.- « Ĝi estas la timo perdi la prestiĝon.

Cl.- *Homo povas erari kaj tion agnoski. Ŝtato povas erari kaj ofte eraras, sed tion ĝi ne rajtas agnoski pro timo perdi sian prestiĝon.*

A.- *Tiu timo perdi la prestiĝon valoras pli ol la vivo. Kiom da nenecesaj konfliktoj daŭras nur pro prestiĝaj kaŭzoj. »*

Cl.- Jean Diedisheim rimarkigas, ke « *fakte tiu timo perdi la prestiĝon kaŝas mizeregon. La ŝtatoj ŝvelas pro fiero kaj vaneco, sed ĉie ili estas venkataj.*

A.- *Unuj eĉ ne kapablas dece loĝigi sian loĝantaron.*

Cl.- *Aliaj dece flegi sian malsanularon kaj vivteni sian maljunularon.*

A.- *Aŭ efektiviĝi la racian egalecon, kiu estas proklamita en la leĝoj.*

Cl.- *Aliloke ili ne kapablas iniciati la socian egalecon aŭ la civitanan egalecon inter la viroj kaj virinoj.*

A.- *Aŭ la socian justecon, pri kiu ili fanfaronas.*

Cl.- *Aliloke ankoraŭ, kaj tio en ĉiam pli vasta regiono, ili eĉ ne kapablas dece nutri sian kreskantan loĝantaron.*

A.- *Kaj ĉie senescepte ili estas absolute nekapablaj forpeli la militajn minacojn. »*

Cl.- Jean Diedisheim pensas, ke « *la timo perdi la prestiĝon pruvas, ke plej ofte ili ĝin jam perdis, ke ili eble ĝin jam ĉiam perdis. Ili ĉesos timi ĝin perdi, kiam ili akceptos sin submeti al alia ordo. Ili retrovos kreskantan prestiĝon, kiam ili akceptos perdi ĝin forlasante parton de sia suvereneco. »*

A.- Kun multaj verkistoj Jean Diedisheim atentigas, ke « *la pensmaniero de la dudekjarcenta homo restas fiksita al falemaj asekuriloj.*

Cl.- *Necese estas faciligi al li la malfiksiĝon, kiu estas jam trikvarone efektivigita.*

A.- *La verkistoj devas komuniki al la moderna homo la kuraĝon rigardi la realecon. Nur kiam ĝi povos esti publike vidata sen okulŝirmiloj, la evoluo kaj revalorigo de la nacioj sin mem trudos. »*

Cl.- Jean Diedisheim verkante sian libron havis du intencojn : Unue priskribi la kadukiĝon de la homa pensmaniero, kiam ĝi kondukas al la burlesko de naciaj ŝtatoj ĵaluzaj de la propra absoluta suvereneco kaj timantaj perdi sian prestiĝon. Due helpi la serĉantojn kompreni la nunan situacion, vidi la realecon, por povi influi la socian evoluon.

A.- La homo, kaj ne plu la ŝtato, estu la objekto de la homaj oferoj.

Cl.- Jam plurfoje okazis en la homara historio pensmutacioj similaj al tiu, kiun atendas Jean Diedisheim kaj la mondfederalistoj. La diferenco estas, ke tiuj mutacioj estis regionaj, dum nun ĝi estas mondskala.

A.- Kiam la ŝtato Novjorko aŭ la kanton Zuriko abolicis sian absolutan suverenecon profite al federigo, estas supozeble, ke ĉe iliaj loĝantoj, iĝintaj respektive usonanoj aŭ svisoj, okazis vera pensmutacio. Ili vidis la limojn de sia patrio malproksimiĝi kaj la ŝtatnomo ŝanĝiĝi. Ili devis lerni kunvivadi kun aliaj homoj konsiderataj ĝis tiam kiel eksterlandanoj.

Cl.- Baldaŭ la plimulto de la homoj komprenos, ke la ŝtatrepresentantoj estas senefikaj por solvi la supernaciajn problemojn, kiuj amasiĝas super la homaro.

A.- Tiam ili pretos akceptis la starigon de novspeca aŭtoritato. Jean Diedisheim antaŭvidas, ke tiu aŭtoritato konsistos el homoj elektitaj samtempe pro ties faka kompetenteco kaj planeda mondkompreno.

Cl.- Tiuj elektitoj devos esti senĉenigitaj de ĉia nacia aŭtoritato kaj investataj de supernaciaj decidpovaj rajtoj.

A.- Al tiu nova institucio apartenos la administrado de la neekspluatataj regionoj : suda poluso, konkeritaj planedoj, dezertoj fertiligitaj per eksternacia financa subteno ; ĝi okupiĝos pri la regulado de la monaj interŝanĝoj, pri la helpo al la subevoluintaj regionoj, pri la kontrolado de la armiloj kaj ties detruado. Jen sennaciigitaj laborkampoj.

Cl.- La naciaj ekonomioj konsekvence devos adaptiĝi al la decidoj, kiuj venos el tiu supernacia institucio.

A.- Estos la kontraŭo de la nuna farado, kie la internacia kooperado estas submetata al la egoismo de la diversaj naciaj ekonomioj.

Cl.- Estas danĝere provi antaŭvidi la estontecon, ĉar oni riskas fali en revan utopiismon neefektivegeblan. Tamen ni vivas en epoko, kiam la kulto al la naciaj limoj kaj la absolute suverenaj naciismoj fariĝas pli utopia, ol la priskriboj pri la estonteco far verkistoj, kia Jean Diedisheim.

A.- Verko kiel tiu libro *Les Patries* [*La Patrioj*] havas la grandan meriton malfermi debatojn pri la nuna internacia moraro kaj ties estonteco.

Cl.- Por Jean Diedisheim, kio mankas al la moderna homo, tio estas scii, kien li deziras iri. Kiam vi aĉetas bileton en stacidoma giĉeto, vi almenaŭ scias, kien vi deziras veturi. Okazas progreso en la socia vivo, nur kiam la homoj volas tiun progreson. La nuna devo de la dudekjarcentuloj estas decidi, kien ili volas iri.

A.- Se oni volas la abolicion de la militaj minacoj, tiam estas necese oferi la prezon. Por Jean Diedisheim, tiu prezo estos :

Cl.- « *Ĉesi konsideri la naciojn kiel aŭtonomaj entoj.* »

A.- Ni staras antaŭ alternativo : ĉu labori al tiu ebla mutacio kondukanta al supernaciismo, aŭ daŭre kulturi la naciismojn kaj alveni al tria mondmilito. Edmond Privat pensis la samon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-